# 14-a kongreso de kroataj esperantistoj Karlovac 19-a - 21-a de junio 2026

## CIRKULERO

**Organizanto**: Dokumenta Esperanto-Centro (Đurđevac)
kunlabore kun Kroata Esperanto-Ligo (Zagrebo)

**Kongresejo**: Aquatica (Konferencijska dvorana)
Ulica Branka Čavlovića Čavleka 1, 47000 Karlovac

**Loĝejo:** Hotelo Carlstadt
Ulica Ambroza Vranyczanya 1, 47000 Karlovac

**Aliĝkotizoj**

Ĉi-kune troviĝas kongresa aliĝilo kaj tabeloj de kongresaj kotizoj kaj loĝkostoj. **La dua aliĝperiodo finiĝos la 31-an de marto 2026.** Nepre aliĝu kaj pagu ĉiujn viajn kostojn ĝis tiu dato, ĉar ĝi estas limdato por mendi loĝadon. Postaj mendoj de loĝado estos traktataj nur se en la hotelo (Hotelo Carlstadt) restos liberaj litoj. Aliĝi vi povas sendante plenigitan (skanitan aŭ fotitan) aliĝilon aŭ nur viajn nomon kaj kontaktojn (telefonon kaj retadreson) al nia retadreso (**dec.kroatio@gmail.com**). **Via aliĝo validas nur se samtempe vi pagas ankaŭ vian kotizon**. **Via mendo de loĝado validas nur se samtempe vi pagas ankaŭ la kostojn de loĝado.**

**Jarkunveno de Kroata Esperanto-Ligo**

Al la kongreso nepre aliĝu membroj de la Asembleo de Kroata Esperanto-Ligo, ĉar dum la 14-a kongreso en Karlovac okazos ankaŭ la elekta jarkunveno de KEL! **La jarkunveno okazos en la Konferenca salono de Aquatica (Ulica Branka Čavlovića Čavleka 1) la 20-an de junio 2026 je la 10h00.**

**Loĝado**

La organiza komitato de la kongreso rezervis por la kongresanoj certan nombron da litoj en la Hotelo Carlstadt. Konkretajn prezojn bv. vidi en la kunsendata reklamilo. Vian ĉambron nepre mendu kaj pagu ĝis la 31-a de marto.

**Programo**

**La ĉefa kongresa programo okazos sabaton, la 20-an de junio inter la 8h00 kaj 18h00 en la Konferenca salono de Aquatica.** Vendredon, la 19-an de junio, ni havos je dispono por leĝera trarigardo de la urbo kaj surloka amikumado, kun eventuala interkona vespero kaj komuna vespermanĝo. La kongresa ekskurso okazos dimanĉon, la 21-an de junio. **Se vi ne povas partopreni la tutan kongreson, ĉeestu almenaŭ la sabatan programon!** Detalan programon ni ankoraŭ kompilas!

**Kongresa ekskurso**

Kongresa ekskurso inkluzivos viziton al **kastelo Dubovac, veturadon per turisma ŝipo *Zora* sur la rivero Kupa, viziton al kastelo en Ozalj kaj trarigardon de la urba akvario Aquatica.** Ĝi startos **dimanĉon, la 21-an de junio 2026 je la 8:00 horo** kaj ĝia prezo de **60,00 eŭroj** inkluzivos ankaŭ tagmanĝon. **Bonvolu antaŭmendi vian partoprenon en la ekskurso kaj pagi ĝis la 31-a de marto!**

**Post la kongreso: Adriatika feriado**

La postkongresan lundon (**la 22-an de junio**), tiuj kiuj aliĝis ankaŭ al la 3-a Adriatika feriado en Prvić Luka, povos ekvojaĝi per komuna buso al la maro. La buso transportos nin al Šibenik, kie ni prenos ŝipon kaj veturos al la insulo Prvić, kie troviĝas nia feriejo. La feriejon ni devus atingi ĝustatempe por havi planitan tagmanĝon kaj jam posttagmeze ĝui la maron!
Se vi ankorau ne aliĝis al la 3-a Adriatika feriado, vi povas aliĝi kaj pagi ĉiujn kostojn ĝis la **31-a de marto**. La prezojn vi povas vidi en la kunsendata reklamilo.

**Konto por ĉiuj pagoj:**
**HR0723400091111000952 (Dokumentacijski esperantski centar)**

**Kontaktoj de la organizanto:**
**dec.kroatio@gmail.com**
**098 248 574**

**Bonvenon al niaj ĉi-jaraj aranĝoj!**